

La migranta 27a Universala Kongreso, 1935, Italio

Radioprelego de Claude GACOND kaj Michel FRÉSARD, SRI, 1986.01.04

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-160/Radiokasedo-160-B-998-1986-Claude-GACOND-La-rulanta-27a-Universala-Kongreso-1935-Italio.mp3>

Cl.- Parolas Claude GACOND kaj Michel FRÉSARD nome de Svisa Radio Internacia.

Hodiaŭ nia studo pri la esperanto-vivo antaŭ 50 jaroj rigardigos nin al Italio. La 27-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis dum la du unuaj semajnoj de aŭgusto 1935 en Italio, havis eksperimentan karakteron: ĝi celis krei turisman esperanto-organizaĵon.

M.- Sed, tre verŝajne la cirkonstancoj ne estis tre favoraj.

Cl.- Fakte jes. La faŝismo en Italio kaj naziismo en Germanio fariĝos pli kaj pli malamikaj al esperanto, la internacia financa krizo detruos la mon-interŝanĝojn kaj devigos multajn esperantistojn rezigni je eksterlandaj vojaĝoj. Krome en 1936 skismiĝos la neŭtrala esperanto-movado. Ne povante kontraŭstari la rezistemon de la svisoj al la translokigo de la sidejo de UEA al Londono, generalo Louis BASTIEN fondos novan organizaĵon konkurencon al UEA sub la nomo Internacia Esperanto-Ligo. Sed pri ĉio tio ni parolos en venontaj elsendoj.

M.- Jes, ni revenu al la 27-a Universala Kongreso.

Cl.- Ĝi migrados tra Italio de la 3-a ĝis la 17-a de aŭgusto 1935. Mi proponas al vi laŭtlegi unuan citaĵon el la revuo ESPERANTO (N° 420 p 121 - aŭgusto 1935):

M.- "Ĉi-tiun jaron la esperantistaro havis sian jaran mond-manifestacion en la Sudo de Eŭropo. Rondcifere 1'500 personoj el 37 nacioj sekvis al la kora invito de niaj amikoj en Italujo, kie nia movado estas malgranda, sed serioze organizita. Post plejparta venko de la laŭtempaj malfacilaĵoj Esperanto progresas en la lando. Kaj la sekvoj de granda demonstracio certe estos favoraj. Tio kuraĝigis niajn samideanojn, inviti la universalan kongreson esperantistan por la unua fojo sur teron italian. Samtempe estis farita eksperimento pri propra turisma organizo tre perspektivdona por la movado laŭ diversaj vidpunktoj. Tiel okazis kvazaŭ "verda invado" en la landon, kies efiko montriĝos certe iom post iom. La esperantistoj trairis preskaŭ la tutan landon. Por kroni la aranĝon, estis organizita postkongresa krozado al Afriko."

Cl.- Laŭ tiu ĉi unua citaĵo ni konstatas, ke la italaj esperantistoj spitis la politikajn malhelpojn provante eĉ influi la faŝisman diktaturon favore al esperanto. Tiu provo estos vana. Koncerne la kongreson mem ni diru, ke arigi 1'500 turistojn por dusemajna vojaĝo sufiĉe kosta en plena ekonomia krizo reprezentis tute certe sukcesegon. Sed la organizantoj antaŭvidis pli da aliĝoj, almenaŭ por la krozado al Afriko, kaj la nekapablo venigi la du aŭ tri mil buĝetitajn homojn necesigis lui alian malpli konvenan ŝipon kaj aliigi aliajn aranĝojn.

M.- Verŝajne la organizantoj pekis per tro da optimismo.

Cl.- Kaj ankaŭ ili ne antaŭvidis ĉiujn organizajn problemojn. Tial en la kongres-raporto la kritikoj abundas. Mi proponas al vi laŭtlegi kelkajn el ili:

M.- "Iuj havis kaŭzon por plendoj jam en Florenco... Ne funkciis la rondveturo... Aliaj tute ne ricevis la dokumentaron..."

Cl.- Pri la teknikaj preskaŭ neeviteblaj komplikaĵoj, kiujn kaŭzas al la organizantoj rulanta kongreso, ni citu tiun ĉi tekston:

M.- "Multaj komplikaĵoj kaj malfacilaĵoj estis kaŭzitaj de nekomprenemo kaj senpacieneco de granda aro da kongresanoj, precipe tiam, kiam en ia manko ankaŭ la organizantoj estis viktimo de ne-antaŭvideblaj cirkonstancoj aŭ devis adaptiĝi al ekzistanta situacio. Ili mem faris efektive ĉion, jes, ĉion, por kontentigi ĉiujn."

Cl.- Tio ne malhelpis, ke kongresanoj ne ricevis la antaŭviditan tranoktejon, devis mem elturniĝi aŭ kontentigi je dormeja lito anstataŭ la antaŭpagita unulita hotelĉambro, ktp. Ofte perdiĝis la kongresanoj ĉar, kiel diras la raporto:

M.- "mankis en la kongresurboj Romo kaj Napolo ia fiksa punkto de koncentriĝo de 1' esperantista vivo."

Cl.- Plej kritikinda estis la vivo sur la ŝipo. Vi legu:

M.- "Prave oni plendis pri la mankoj konstatitaj en la krosado... Estis konate, ke la unue luita pli granda ŝipo itala "Leonardo da Vinĉi" ne povis esti metata je nia dispono. Ĉu estas klarigotaj la malfacilaĵoj trovi alian ŝipon, ĝis la organizantoj sukcesis lui la ŝipon "Sinaia" de la Kompanio Fabre en Marseille? Evidentiĝis nur dum la krosado, ke tiu ĉi ŝipo estis ne sufiĉe konvena por nia aranĝo... La membroj de la loka kongresa komitato fariĝis la malfeliĉaj viktimoj de koncentritaj plendoj..."

Cl.- La raporto notas, ke la plendantoj estis precipe ne-esperantistoj. Fakte, kvankam la vorto "krokodilo" ne estis jam inventita, tro abundis en tiu turista kongreso la ne-esperantistoj. Oni celis la nombron, anstataŭ la kvalito lingva, kaj tio multe komplikigis la komunan vivon, ĉar la neesperantistoj ne interesiĝis pri la babiladaj renkontiĝoj. Ili volis servojn, balojn, ktp, kie la lingvo esperanto ne aŭdiĝu.

M.- Ĉu ree okazis samaj turistaj kongresoj?

Cl.- Ne! Tre verŝajne la itala Universala Kongreso de 1935 lasis malagrablajn rememorojn. Sed la raporto, kiel volas la tradicio, parolas pri grandega sukceso por Esperanto. Tio estas formulo, kiun oni retrovas en ĉiu kongres-raporto. Jen vi legu ĝin en la konkluda parto de tiu kritikplena raporto:

M.- "La koncernaj instancoj de la movado devas tiri la necesajn praktikajn konsekvencojn el la faritaj spertoj. La konkludo, kiun ni povas kaj devas objekte fari, estas nur unu: La Dudeksepa, kiel tuto, estis grandega sukceso por Esperanto !"

Cl.- Jen vi legu lastan citaĵon, kiu donas ideon pri ĉies laceco:

M.- "Je la 13-a horo de ĵaŭdo longaj specialvagonaroj forlasis la stacidomon de Romo. Ili estis plenaj de multaj bonhumoraj, sed lacaj esperantistoj. Ni ne parolas pri la karavanestroj kaj aliaj laborantoj sufiĉe elĉerpitaj. En grandega varmo, post bela veturado, rekomenciĝis la

ekspedado al la hoteloj kun ĉiuj agrablaĵoj, malagrablaĵoj kaj surprizoj, ligitaj precipe al amas-aranĝo. La malfeliĉaj komitatanoj de UEA devis denove kunveni vespere. En la aŭlo de la Reĝa Universitato samtempe okazis interesaj prelegoj de la "Somera Universitato" pri Vesuvo kaj Pompejo de profesoro Canuto kaj de d-ro Orengo..."

Cl.- Jen la ĉeftraĵoj de eksperimenta Universala Kongreso okazinta antaŭ kvindek jaroj. La ideo ne estis malbona.

M.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude GACOND kaj Michel FRESARD diras al vi, ĝis la venonta sabato !

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*